



# aktuala

## 35-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgio, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 200 ekzempleroj.

In formoj : <http://users.belgacom.net/EBG> ; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be) ; [xurb.leadhoster.com](http://xurb.leadhoster.com) ; [esperanto.net](http://esperanto.net) ; [lernu.net](http://lernu.net) ; [uea.org](http://uea.org) ; [liberfolio.org](http://liberfolio.org) ; [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net) ; [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala) ; [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Diemante A. pri Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda
- Paĝo 3 - Marek Blahuš pri Andoro Konkerita
- Paĝo 4 - Osmo Buller pri Gazetaraj Komunikoj de UEA
- Paĝo 8 - Jacob Hasbun tradukis araban noveleton N19
- Paĝo 9 - Poemaro de Garcia, Bronŝtejn kaj Buarque
- Paĝo 10 - Liba Gabalda raportas pri kvar Esperantaj Eventoj
- Paĝo 18 - Karstaj Tagoj 2010 en Triesto 29/10 ĝis 10/11
- Paĝo 19 - Bildoj instruaj aŭ amuzaj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Julio kaj Aŭgusto 2010

grupo ferii ek de merkredo 30 Junio ĝis merkredo 8 Septembro

### Septembro 2010

- 15 Trevor Steele prezentas sian plej novan romanon "Flugi kun kakatuoj"
- 22 Bernard-Regis Larue pri astronomio
- 29 Marc Demonty pri signifo de niaj sonĝoj (revoj)

### Oktobro 2010

- 6 Marcel Delforge pri lia vojaĝo trans Siberio
- 13 Semajna kunveno
- 20 Diemante Aniĉiene pri historio de Litovujo
- 27 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

## 83-A KONGRESO DE SENNACIA ASOCIO TUTMONDA

La SAT-83 okazis la 1an ĝis la 6an aŭgusto 2010 en Braŝovo, Rumanio. Partoprenis ĉirkaŭ okdek esperantistoj el dek ses landoj. La kongreso okazis en la Nacia Kolegio Andrej Ŝaguna. Konstruaĵo el la mezo de la XIX-a jarcento (1851), realigita laŭ planoj de la braŝova arkitekto Ștefan Emilian, ĝi estas kombinaĵo inter la renesanca, klasika kaj Empire stiloj.

Dimanĉe la 1-an de aŭgusto je la 9-a horo, en la grava salono Ferdi Vince, komencis la solenan malfermon Rodica Todor, prezidantino de la Organiza Kongresa Komitato. Ŝi diris ke, en ĉi tiuj tagoj la urbo Braŝovo festas 755 jarojn de atestita ekzisto kaj estas honoro, ke tia aranĝo, la 83-a SAT kongreso, estos parto de la programo de tiuj festaj tagoj de Braŝovo. Poste la kongresanojn salutis Carol Ambrus, vicprefekto de la distrikto Braŝovo. Li iom rakontis pri historio de Braŝovo, pri antikva tajpado de tre valoraj libroj, pri kunesto de tri grandaj kulturoj (transilvana rumana, germana, hungara) kaj vivo de ĉiuj en paco kaj amikeco. Vicurbestro Adrian Gabor estis tre ĝoja pro havi eblecon saluti kongresanojn en sia urbo, li memoris ke antaŭ kvin jaroj estis inaŭgurita placo de Esperanto. Poste sekvis salutvortoj de la sekretario de la kultura komisiono de distrikta konsilio de Braŝovo, direktoro de unua lernejo kaj muzeo Vasile Olteanu.



La direktorino de la Nacia Kolegio Andrej Ŝaguna prof. Mariana Ionescu salutis kaj bonvenigis en esperanto je nomo de ŝiaj kolegoj kaj de ŝi mem. Direktorino de la lernejo N25 Rodica Ghiorphișor rakontis ke la lernejo havas projekton kun la E-Asocio kaj instruas esperanton. Mihai Trifoi, profesoro kaj membro de la Ligo de Esperantistoj Instruistoj kaj Florin Dobrescu, prezidanto de la Nacia Konfederacio de Sindikatoj de la fervojtransportistoj en Rumanio, ambaŭ deziris plensukceson al la kongreso. Prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT, Jakvo Schram unue mirigis pri la beleco de la urbo kaj pri la belega salono de kongresejo, salutis kaj bonvenigis kongresanojn, parolis pri aferoj de la SAT-anoj. Li anoncis oficiale malfermitan la 83-an SAT kongreson en Braŝovo, kaj deziris ke la etoso estu amika, la laboro estu fruktodona, la turismaj partoj estu instruaj kaj agrablaj kaj la vino estu bongusta. Poste sekvis kantado de gelemantoj de la lernejo N25, fotado de la

partoprenantoj apud la kongresejo de monumento Andrej Ŝaguna. En salono estis denove salutvortoj de la diversaj societoj, esperantistaj grupoj, SAT frakcioj.

Kongreso daŭrigis ĝian laboron post tagmaĝo. Kiu ne kunsidis, partoprenis en la ekskurso-ĉiĉeronado de Rodica Todor tra la malnova urbo. Poste okazis ekskurso al Bran (kastelon de Drakula) kaj komuna vespermanĝo en Poiana Brașovo en tipe rumana restoracio "Coliba Haiducilor". La manĝo estis bongusta, etoso estis agrabla kaj forirante ni eĉ dancis... Tiel finiĝis unua tago...

Dum la aliaj kongresaj tagoj okazis tiel same plenajn kunsidojn, sociajn forumojn, kulturajn programojn. Inter alie estis teatraĵo prezentita de la grupa teatro "E. Ionescu", kantado fare de la infankoruso "Kanzonetta", nacia kaj internacia vespero, ekskursoj al Sinaia, Sibiu, Sighisoara, Bukureŝto, komuna vespermanĝo en restoracio "La Karpata Cervo" kun spektaklo de popoldancoj. Ankaŭ dum la kongreso funkciis la libroservo.

Mi ne povas pri ĉio rakonti al vi detale (tio daŭrus tre longe), vi bezonas veni kaj sperti mem. Mi nur povas diri, ke kongreso estis sukcesa, interesa kaj agrabla. Mi ĝojas ke mi pratoprenis en ĝi. Ankaŭ mi iomete konatiĝis kun bela Transilvanio, historio de Rumanio, renkontis novaj kaj jam konataj esperantistoj... Mirinda "lando" estas Esperantujo! Ĝis la revido en la sekvonta SAT Kongreso en Sarajevo!

Diamante Aniĉiene  
(en supra fotoĵo dum SAT kongreso)

### ANDORO KONKERITA

Esperanto floras plejparte en Eŭropo, malgraŭ tio kelkaj eŭropaj landoj simple estas tro malgrandaj por ke estu tie por ĝi loko. Unu el tiuj estas Andoro, lando 65-oble malpli granda ol Belgio, kie laŭ Vikipedio la unuŝola esperantisto mortis en 1998. Ĉar apenaŭ estas eble organizi esperanto-aranĝon en tiu montara landeto, kie ĉiu loketo tre kostas kaj movado mankas, decidis la partoprenintoj de la junulara renkontiĝo FESTO okazinta en Francio apud Tuluzo fari tien ekskurson. Okazinta la 17-an de aŭgusto 2010 kaj organizita de Marek Blahuš kaj Salomé Hug, ĝi venigis al Andoro 33 junajn esperantistojn el 10 landoj - eble la plej granda kvanto kiu iam ajn kune vizitis ĝin. Plej multaj homoj iras al Andoro por skii aŭ aĉeti, sed ni ne faris tie (nur) tion: Dum promeno tra la ĉefurbo Andoro la Malnova ni per afiŝo reklamis esperanton, kaj kompreneble parolis la lingvon ĉie: ankaŭ en Casa de la Vall - la plej grava konstruaĵo de la lando, kie en unu ĉambro kunvenas ankaŭ la 28-kapa parlamento kun la 7-kapa registaro. Tie la ĉiĉeronino sciis respondadi la esperantlingvajn demandojn de la grupanoj eĉ sen interpretado, ĉar ŝi ja pro la komplika lingva situacio de Andoro regis ne nur la katalunan (oficialan lingvon de tiu lando, kaj nur tiu lando), sed ankaŭ almenaŭ la hispanan, la francan kaj la italan. Andoro ja estas eta, sed tre internacia lando.

Raportis Marek Blahuš, diskonigis Germain Pirlot

### MAURO NERVI EN NOVEMBRA MALFERMA TAGO DE UEA

Mauro Nervi, elstara Esperanto-poeto kaj prezidanto de la Akademio Literatura de Esperanto, estos la ĉefpreleganto de la 33-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de novembro. Nervi prelegos dum la Tago dufoje: pri la idea esenco de la Akademio Literatura kaj pri la Esperanta kandidato por la literatura Nobel-premio Baldur Ragnarsson.

En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

### BULLER KAJ MAGALHÃES EN HANOJO PREPARE UK2012

Ĝenerala Direktoro Osmo Buller kaj Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães vizitis Hanojon de la 29-a de aŭgusto ĝis la 5-a de septembro prepare por la Universala Kongreso 2012. Kun pli ol 60 aliaj gastoj el multaj landoj, ili estis invititaj de la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO) lige kun la 65-a datreveno de la sendependeco de Vjetnamio, kiun oni festis la 2-an de septembro. En la tago antaŭ la nacia festo la gastoj estis akceptitaj de la prezidento de Vjetnamio s-ro Nguyen Minh Triet kaj ili partoprenis en la solena festo en la Nacia Kongresa Centro. La riĉa

programo inkluzivis i.a. viziton al la Maŭzoleo kaj Muzeo de Ho Chi Minh.

Antaŭ kaj post la programo de VUAO Buller kaj Magalhães havis laborkunsidojn kun la Centra Komitato de Vjetnama Esperanto-Asocio kaj kun la membroj de la Loka Kongresa Komitato de la 97-a UK, kiu okazos en la vjetnama ĉefurbo en 2012. Kvankam LKK ankoraŭ ne estas formale nomumita, ĝi jam diligente laboras. La oficistoj de UEA vizitis ankaŭ la Fremdlingvan Universitaton, en kies ejoj okazos la ĉefa parto de la programo de la 97-a UK, kaj la tre modernan Nacian Kongresan Centron. Pri la perfekta taŭgeco de ĉi-lastata kiel ejo por la inaŭguro kaj fermo de la UK la oficistoj de UEA povis certiĝi dum la solenaĵo de la nacia tago, kiu okazis tie.

Fine de la vizito s-ro Vu Xuan Hong, prezidanto de VUAO, transdonis al Buller la medalon "Pro Paco kaj Amikeco inter la Popoloj" pro lia kontribuo al la amikeco kun la vjetnama popolo kaj al la vjetnama Esperanto-movado dum pli ol kvardek jaroj.

### ELEKTITA ESTRARO

#### CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

La nova Estraro de UEA komencis la elektadon de komisiitoj kaj komisionoj por plej diversaj agadkampoj. Temas pri ampleksa tasko, kiu okupos la Estraron ĝis la fino de la jaro.

Kiel la unua estis elektita la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj

Problemoj (CED). La nova estraro de CED, kiu en la strukturo de UEA havas statuson de komisiono, konsistas el Detlev Blanke, Mark Fettes, Sabine Fiedler, Federico Gobbo, Wim Jansen, Kimura Goro Christoph, Christer Kiselman, Katalin Kovats, A. Giridhar Rao, Humphrey Tonkin kaj José Antonio Vergara. Kiel direktoro de CED plu funkcios prof. Tonkin. Flanke de la Estraro de UEA pri rilatoj kun CED respondecos estrarano Amri Wandel.

CED estas la esplora-dokumenta branĉo de UEA. Ĝiaj plej konataj aktivaĵoj estas la okazigo de Esperantologia Konferenco en Universalaj Kongresoj kaj la eldonado, kun la nederlanda firmao John Benjamins, de la plurlingva scienca revuo "Language Problems & Language Planning" kaj de la novaĵbulteno "Informilo por Interlingvistoj".

Gazetaraj Komunikoj de UEA N395 2010-09-12

### **UEA DECIDOS**

La Komitato de UEA povis efike eklabori jam en sia unua kunsido sabaton, la 17-an de julio, ĉar ĝi estis kvoruma tuj en la komenco, kio eĉ en eŭropaj UK-oj ne ĉiam okazas. Entute 38 komitatanoj, nome 32 komitatanoj A (15 el ili estis anstataŭantoj), 3 B kaj 3 C, partoptenis almenaŭ unu el la tri plenkunsidoj en Havano. Je la tempo de la UK nia supera organo havis 61 membrojn, el kiuj 47 estis komitatanoj A kaj 6 B, kiuj krome alektis 8 komitatanojn C. La

5  
nombro de komitatanoj A ankoraŭ kreskos, ĉar kelkaj landaj asocioj ne jam nomumis siajn reprezentantojn. Ĝis la UK estis nomumitaj ankaŭ 6 observantoj de landaj asocioj kun malpli ol 100 membroj, sed neniu el ili ĉeestis. Krom en tri plenkunsidoj, en ok subkomitatoj la Komitato laboris, kiujn la komitatanoj povis partopreni laŭ siaj interesoj kaj kiuj estis malfermaj ankaŭ al nekomitatanoj. Estis subkomitatoj pri financo kaj administrado, ekstera agado, edukado, informado, kulturo kaj kongresoj, landa kaj regiona agado, faka kaj scienca agado, kaj junularo. La ĉefa tasko en la unua kunsido estis la elektoj. La Komitato voĉdonis per sekreta baloto pri la proponoj de la Elekta Komisiono (Renato Corsetti, Lucy Harmon kaj Ileana Schroeder), kiujn ĝi ricevis jam en majo. Unue la komitatanoj A kaj B elektis komitatanojn C, da kiuj la Statuto rajtigas elekti maksimume kvaronon de la nombro de A kaj B, por "*certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj*". Ĉiuj ses kandidatoj sukcesis. Por Loes Demmendaal voĉdonis 24, kontraŭ 1 kaj 2 sindetenis; la rezulto de Paulo Branco estis respektive 21, 4 kaj 1; de Jean Codjo 20, 4 kaj 2; de Josep Franquesa Solé 20, 5 kaj 1; de Stefano Keller 20, 0 kaj 6; kaj de Marcel Delforge 19, 1 kaj 6. En la dua kunsido estis alektita kiel komitatano C ankaŭ Philippe Chavignon per 23 voĉoj por, 2 kontraŭ kaj 7 sindetenoj, kaj en la

6  
lasta, tria kunsido Julián Hernández Angulo per 32 voĉoj por, 1 kontraŭ kaj 1 sindeteno. Sekvis la elekto de la Estraro. Ankaŭ en tiu elekto la propono de la Elekta Komisiono pri 7-membra Estraro estis akceptita preskaŭ unuanime. Kvar membroj de la antaŭa teamo estis reelektitaj. Renovigon de la mandato de Probal Dasgupta kiel prezidanto poris 26 kaj kontraŭis 2 komitatanoj; 4 detenis sin. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario 27, 4 kaj 1 voĉojn. Same kiel antaŭe, Nourmont respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj, kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28 voĉoj por, 2 kontraŭ kaj 2 sindetenoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gutiérrez González pri landa kaj regiona agado (resp. 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri faka kaj scienca agado (23, 5, 4). Gutiérrez kaj Wandel tamen ne estas novicoj. Ambaŭ havas estraran sperton jam el la periodo 2004-2007, Wandel ankaŭ el la periodo 1995-1998. Por la Estraro estis kandidatigitaj ankaŭ José Antonio Vergara, kiu membris ankaŭ en la malnova konsisto, kaj Martin Schaeffer. Ilin la Elekta Komisiono tamen ne inkluzivis en sia propono. Konforme al la regularo la Komitato unue voĉdonis pri la konsisto proponita

de la komisiono. Se ĝi kiel tuto aŭ unuopaj kandidatoj ne estus akceptitaj, venus vico al la du aliaj kandidatoj. Se ankaŭ ili ne sukcesus, komitatanoj povus surloke prezenti novajn nomojn. Kiel kutime, ankaŭ ĉi-foje la Elekta Komisiono estis kritikata pri manko de alternativaj kandidatoj.

Tio estis malprava kritiko, ĉar la komitatanoj mem rajtis proponi kandidatojn kaj ne mankis tempo por fari tion. Ĉar la Estraro estis elektita praktike unuanime, la Komitato evidente estis kontenta pri ĝia konsisto. Se iuj malkontentas, ili faras saĝe, se ili jam nun komencas prepari sin por la venonta fojo kaj serĉi kandidatojn. Pri propra pasiveco oni ne kulpigu regularon.

Kiel komitataj reviziantoj estis reelektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; 2 sindetenis. Kun simila apogo estis elektitaj ankaŭ la tri membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeck ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3. Per unuanima elekto, Ulrich Lins kaj Brian Moon konsistigas komisionon, kiu pristudos la petojn de landaj kaj fakaj asocioj pri aliĝo aŭ kunlabora kontrakto. En la tagordo en Havano tiaj petoj ne estis, sed oni notis nuliĝon de la kontraktoj kun la malfondita Eŭropa Klubo kaj kun Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio, kiu ĉesis aktivi. Forta aplaŭdo, ripetita en la Solena Inaŭguro, akompanis la unuaniman elekton de Ulrich Brandenburg,

ambasadoro de Germanio en Moskvo, kiel sesa membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Biografio de s-ro Brandenburg aperas en la oktobra numero de Esperanto. La Komitato akceptis ankaŭ la proponon de la Estraro krei Diplomon pri Elstara Kultura Agado kiel samrangan honorigon apud la pli frue starigita Diplomo pri Elstara Agado. Pri la diplomitoj decidas la Estraro, kiu en la ferma ceremonio de la 95-a UK anoncis la ĉi-jarajn distingitojn. Dum la traktado de la Estrara Raporto pri la jaro 2009 montriĝis, ke la Komitato estas relative kontenta pri la pasintjara agado, eĉ se la malkresko de la membraro plenkaŭze maltrankviligas ĝin. La diskuto estis vigla, sed intervenis nur komitatanoj, kvankam ĉiu ajn kongresano rajtus paroli. Tamen eĉ kiel aŭskultantoj preskaŭ tute mankis publiko. Eble tiun parton de la komitatkunsido indus denove titoli per la iama termino "ĝenerala kunsido de UEA" por emfazi, ke ĝi ne estas rezervita nur por la komitatanoj, eĉ se tiuj ĉi decidas pri la akcepto de la raporto. Kelkajn vortumojn en la raporto pri 2009 la Komitato ĝustigis. Informo pri ili aperas en la sekva numero de la revuo Esperanto post la pretiĝo de la protokolo. Nova Strategia Plano ĝis la jaro 2020 ankoraŭ ne estis definitive benita, sed oni akceptis ĝin kiel ankoraŭ modifeblan projekton cele al aprobo en UK de Kopenhago. Ĝiaj laboraj partoj tamen estas jam aplikeblaj. Pri la finpretigo respondecos la Estraro kaj la tute nova Komisiono pri Strategiaj

7  
Demandoj, kiu ricevis vastan taskon, nome "gvidi diskutojn kaj planadon por renovigo de la Asocio, inkluzive de eventualaj Statutaj ŝanĝoj". Kiel ĝia kunordiganto estis elektita Mark Fettes kaj kiel aliaj membroj Petro Balaž, Renato Corsetti, Ileana Schroeder, José Antonio Vergara, Sonja Petrović-Lundberg, kaj Osmo Buller. Krome oni petis la estrarojn de UEA, TEJO kaj ILEI nomumi po unu membron. Intertempe la Estraro de UEA jam nomumis Loes Demmendaal kaj tiu de ILEI sian prezidanton Stefan MacGill. Nia revuo sendube fariĝos grava forumo por la komisiono, kiu celas enplekti en la diskutojn la tutan UEA-familion kun ties diversaj asocioj kaj organoj kaj ankaŭ la ĝeneralan publikon. La plej febraj diskutoj temis pri financoj kaj nia revuo. En la pasinteco tiajn diskutojn kaŭzis gravaj deficitaj, sed en 2009 la en- kaj elspezoj estis en ekvilibro jam por la kvara jaro. Ĉi-foje temis pri la deziro de iuj komitatanoj direkti parton de la heredaĵoj al fondaĵo por informado kaj disvastigo kaj ne al la kapitalo, kiel preskribas la Statuto. La propono estis sendita al la Financa Komisiono por pristudo. Konfuzon renkontis la decido de la malnova Estraro retiri la kontrakton kun la redaktoro de nia revuo, anonci konkurson pri redaktoreco kaj redifini la redaktopolitikon, kiun ĝis nun regis gvidlinioj el 1994. Estis decidite, ke la Estraro konsultu la Komitaton pri la nova redaktopolitiko antaŭ ol fari aliajn decidojn. Osmo Buller

8

**NOVELETO 18 (7a-13a jarcentoj)**  
Abu Bakro bin Abdu-l-Bakijo informis nin. Li diris: Alijo binu-l-Muhassino informis nin laŭ sia patro, laŭ sia avo. Li diris: Abu Muhammado-l-Hasano bin Muhammado-s-Silahijo rakontis al ni. Li diris: unu el la servistoj, apartenanta al la servistaro de Al-Mutadido rakontis:  
Ni estis ĉirkaŭ la lito de Al-Mutadido, iam tagmeze, kiam li estas endormiĝanta post ol li manĝis, ĉar ni estis taskitaj resti apud lia lito ĉiufoje, kiam li dormas, tage aŭ nokte. Li vekigis konfuzite, kaj kriis: «Hoj, servistoj!» Ni tuj respondis. Li diris: «Malfeliĉuloj! Rapidu plaĝen! Kaptu la unuan personon, kiun vi ekvidos malsupreniranta la riveron per vaka boato; alkonduku lin al mi post, kiam vi estos sekurigintaj la boaton». Ni rapidis tien kaj ekvidis boatiston sur sumajrijato [la sumajrijato estas tre granda boato por rivera navigado]. Ni venigis lin, kaj kiam Al-Mutadido vidis la boatiston, ne multe mankis, ke li mortu. Li kriegis al li tiel forte, ke sia animo preskaŭ forflugis de li; li diris al li: «Diru al mi, malbenito, la veron pri via aventuro kun la virino, kiun vi murdis kaj prirabis hodiaŭ; se ne, mi fortranĉigos al vi la kolon!» Balbutaĉante, li respondis: «Jes, hodiaŭ tagiĝe mi troviĝis en tia-tia enŝipejo. Tiam, enŝipiĝis virino, tia, kiam mi neniam estis vidinta, vestita per luksaj vestoj; ĉarmece mi

manovris ŝin ĝis prosperis al mi buŝostopi kaj dronigi ŝin, kaj kapti ĉion, kion mi trovis sur ŝi. Mi ne aŭdacis alporti la rabitaĵon al mia domo el timo, ke la fariĝo estu konata. Mi do klopodis por fuĝi kaj, enŝipiĝinte, tuj forveturis kapuse al Vasito [antikva iraka urbo, inter Basrato kaj Bagdado, maldekstre de la rivero Diĝlato (Tigriso)]. Ĉi servistoj malhelpis min kaj alkondukis min ĉi tie.» Li diris lin: «Kie estas la juveloj kaj la cetero de la rabitaĵo?» Li respondis: «Ĉe la antaŭaĵo de la boato, sub junkomato.» Al-Mutadido diris al la servistoj: «Alportu al mi ĝin.» Ili tien iris kaj revene kunportis ĝin. Li diris: «Kaptu la boatiston kaj dronigu lin!» Jen ili faris tion. Poste li ordonis, ke estu elkriite en Bagdado, ke tagiĝe elhejmiĝis virino en la direkto al tia-tia enŝipejo, vestita per luksaj vestoj kaj juveloj; ke kiu ajn ŝin konas prezentu sin kaj priskribu kion ŝi surhavis, kaj forportu ĝin, ĉar la virino pereis. La duan trian tagon, anoj de ŝia familio prezentis sin kaj donis priskribon pri tio, kion ŝi surhavis. Li transdonis al ili ŝiajn posedaĵojn. Ni diris lin: «Via moŝto, ĉu vi ricevis superteran inspiron?» Li respondis: «Mi sonĝe vidis oldulon, kun kapharoj, barbo kaj vestoj blankaj, kriantan: 'Ahmado! Rapidu kapti kaj aresti la unuan viditan boatiston malsuprenŝipantan, kaj konfesigu al li la aventuron kun la virino, kiun li murdis kaj prirabis hodiaŭ, kaj apliku al li la laŭlegan punon!' Kaj jen kio okazis, kiel vi vidis.»  
At-Tanuĥijo, Frandaj delikataĵoj de la konversacio.  
Jacob Hasbun, membro de EBK, elarabigis

## POEMARO

### SONETO AL MIA AMIKO ROMAN DOBRZYNSKI

Monotone, monato post monato,  
falante en la puton de l'nenio  
kie finiĝas tuta agonio,  
pasas la tempo sen kosma kompatio.

Ĉio forpasas tra la tempo-bato  
fandiĝante en reva fantazio;  
sed, el la universa imperio  
denove alvenos nova debato.

Mortis en pola limo mia mio,  
kiu en mia koro dissolviĝos;  
nun, mi atendas, ke en Varsovio,

denove mia mio renaskiĝos.  
Rimarku, "Roman", kiel pasas ĉio  
kaj kiel ĉio al ni renaskiĝos.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

### MIAJ BONAJ KONATOJ

Miaj bonaj konatoj,  
inventemaj kaj spirititaj,  
kiel vi povas vivi  
kun pensoj kaŝtritaj?

Babiladi sentriste  
dum pereas amikoj,  
verki sen analiz' de  
temoj transbilikaj?

Iom monstra epoko,  
plu daŭranta hodiaŭ,  
vin tutcerte pardonos.  
Ĉu ankaŭ la Dio?

Miŝa Bronŝtejn, 1998-2000,  
Tifvin, S.Petroburgo, Rusujo

## "KAROLINA" BRAZILA MUZIKO

Karolina...  
En l' okuloj fundaj  
Gardas sin dolor'  
De l' tuta mondo, inunda.  
Sed ne venos help'  
De ŝia plor'.  
Mi montris al ŝi:  
Solv' estas for.  
Kaj mi diris pli:  
Por danc' – jen hor'.  
Kaj nun devas ni  
Ĝui el kor'.  
Ekstere, am'...  
Rozburgon' iĝis flor'.  
Estis samba jubil'.  
Falis stel' kun fascin'.  
Riditis mi kun apelo:  
Vidu fenestren – jen belo!  
Sed ŝi ne rimarkis ĝin...  
Karolina...  
En l' okuloj tristaj  
Gardas sin plenam'  
Sed nun sen viv', vanekzista.  
Mi avertis jam:  
Tuj venos fin'.  
Kaj donis en van'  
Ĉion – sen lim'  
Kun versoj de am'  
El la anim'.  
Nun – kial ĉi dram'?'  
Kia destin'!  
Ekstere, am'...  
Mortis roz' sen kolor' .  
Fest' finiĝis sen bril'.  
Nia bark' lasis nin...  
La temp' tra fenestro pasis  
Kaj en la inerto ŝin lasis  
Nur ŝi ne rimarkis ĝin...

Poemo kaj muziko de Chico Buarque de Holanda  
tradukis Jair Salles, Brazilo  
INKO, Informilo de KKE, N 9-10/2008

10

## LIBA GABALDA RAPORTAS KVAR ESPERANTAJ EVENTOJ KUBO DUM JULIO 2010

Kubaj esperantistoj havis ĉi-jare tre varman sezonon. Krom vere varmega vetero ili ŝvitis ankaŭ pro la organizado de kvar Esperanto-eventoj, kiuj tie okazis somere. En la bela feriejo "Canimao" proksime al la urbo Matanzas okazis porinstruista ILEI konferenco kaj seminario. Sekvan semajnon oni ĝuis la 95-an Universalan Kongreson en la ĉefurbo Havano kaj samtempe okazis, ankaŭ en Havano, la 41-a Infan-junula Kongreseto en hotelo "Acuario". Lastan semajnon de julio la gejunuloj havis sian 66-an Junularan Kongreson en la bela ripozloko "Villa Trópico" en la regiono de Matanzas.

La eventoj malsimilis unu al la alia, sed pluraj aferoj estis komunaj: senproblema interkompreniĝo, plezuro lerni, interŝanĝi ideojn, spertojn, motivigo al poresperanta agado, ĝojo renkonti gekonatojn kaj krei novajn amikecojn.

Mia edzo Floreal kaj mi ĝuis tri el tiuj-ĉi eventoj. Mi povas nur pozitive paroli pri ili. La etoso estis gaja kiel la kubana popolo. La riĉenhavaj programeroj abundis en ĉiuj eventoj. Altkvalitaj prelegoj alportis pliajn sciojn. En intensaj kursoj oni plu lernis kaj vesperaj artaj programeroj pliriĉigis nian kulturalan horizonton. Kongresaj ekskursoj gvidis nin al interesaj kaj

admirinde belaj lokoj de Kubo. Ni havas belajn rememorojn kaj pozitivajn impresojn de tiuj-ĉi internaciaj renkontiĝoj. Kubo postlasis en ni deziron de baldaŭa reveno.

### 43A ILEI-KONFERENCO

Unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso en Havano, okazis en Kubo, de la 11a ĝis la 17a de julio 2010, la 43-a konferenco de instruistoj en bela ripozejo "Canimao" proksime al la urbo Matanzas. Partoprenis ĝin pli ol 60 gesamideanoj el 26 landoj, inter kiuj multaj gejunuloj el Latinameriko. Ili ĉefe ĉeestis seminarion, kie ili havis trejnsekciojn por plialtigi sian lingvan nivelon de Esperanto sub gvido de spertaj pedagogoj. Ĉiuj estis ravitaj kaj ege kontentaj pri tiu-ĉi unika ebleco lerni kaj progresi en la Internacia Lingvo.

Tuj post bonvenigaj paroladoj kaj enkondukaj vortoj pri la konferenco kaj la seminario komenciĝis la programita laboro. Héctor Jiménez Batista parolis pri instrumentadoj, lia prelego titolis: "Lingva talento, profesia kompetenco, motivado kaj ties influo al E-lernado". Maritza Gutiérrez González konatigis nin pri la alfabetiga programo kaj la nacia eduksistemo en Kubo, Julián Hernández Angulo parolis ĝenerale pri instruado, pri principoj kaj praktiko, pri didaktikaj komponantoj kaj komunikmetodoj. Vespere Stefan MacGill prezentis kaj gvidis kvizon pri ĝeneralaj

scioj pri ILEI kaj E-movado, en kiu ĉiuj aktive kunlaboris. La dumsemajna programo estis riĉa kaj varia. La komitatanoj plurfoje kunsidis kaj diskutis pri diversaj raportoj kaj taskoj. La Konferenco ĉefe traktis lingvajn temojn. Oni parolis pri laboro de ILEI, pri estontaj planoj kaj projektoj. Okazis prelegoj pri metodologio de Esperanto-instruado, pri kuba kulturo, pri Esperanto en Kubo, pri gramatikaĵoj en Esperanto, pri movadaj aspektoj kaj celoj de ILEI. Prelego pri “Projekto de Kroata E-ligo”, kiun prezentis Marija Jerkoviĉ liveris interesajn spertojn. Aurora Bute informis pri renkonto de junulgrupoj el kvin nacioj kiuj partoprenis pasintaŭtune en Francio aranĝon MIREGE (Muzika Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Gejunuloj Eŭropaj). Pri lerneja agado kaj demando kiel oficialigi kaj normaligi Esperanton en lernejoj diskutis Marija el Kroatio, Agneta el Svedio kaj Hazel el Aŭstralio. Por interesitoj okazis kurso kaj praktikado de la hispana lingvo, kiun gvidis niaj kubaj ŝamideanoj Marta kaj Pedro. Ĉiuvespere, antaŭ aŭ post la manĝo, ni kunsidis kaj aŭskultis raportojn pri koncernaj dumtagaj programeroj. Poste ni bone amuziĝis dum skeĉoj, kvizo, humuraj rakontoj, deklamoj, kunkantis en akompano de gitaro kaj spektis diversajn landajn prezentaĵojn. Dum la Internacia

11

Vespero ĉiuj partoprenantoj prezentis ion pri sia lando. Tiel ekestis bunta kaj amuza programo. En la semajno okazis tuttaga ekskurso al la famkonata feria loko Varadero kaj duontaga al urbo Matanzas, kiu famas pro multaj pontoj. Tie ni vidis teatron Sauto kaj vizitis du muzeojn; “Palacio de Junco” kaj apotekan. En Matanzas ankaŭ okazis la Lingva Festivalo al kiu ni ĉiuj fervore prepariĝis. Ni sukcesis prezenti 20 lingvojn. La aranĝo okazis sur la placo “Parque de la Libertad”. La intereso pri ĝi estis granda, sed bedaŭrinde pro subita pluvego ni devis transiri kaj daŭrigi nian prezentadon en biblioteko, kien jam ne venis tiom da homoj. Tamen ĝi estis tre interesa sperto. Pluraj urbanoj petis informojn pri Esperanto kaj pri kursoj. Stefan MacGill, la prezidanto de ILEI, kaj Ana Montesinos, la ĉefa kunordiganto de la konferenco, zorgis, ke la programo bone disvolviĝu kaj la LKK-anoj, krom organizaj laboroj, strebis pri la bonfarto de ĉiuj partoprenantoj. Gejunuloj bone integriĝis en plenkreskulan partoprenantaron kaj efike kunlaboris. La Konferenca temo “Edukado por kultura proksimiĝo” estis bone plenumita. Al la UK en Havano ni iris pliriĉigitaj, je efika lernado, novaj spertoj kaj belaj amikaj rilatoj.

### 95a UK EN HAVANO

Post dudek jaroj oni denove kongresis en Kubo. De la 17a ĝis la 24-a de julio 2010, okazis en

12

Havano la 95-a Universala Kongreso de Esperanto. Sub tropika suno proksimume milo da esperantistoj el 59 landoj ĝuis neforgeseble agrablan kaj varman kongreson. Feliĉe povis partopreni ĝin ankaŭ multaj kubanoj kaj pluraj latinoamerikanoj. La inaŭguro estis kiel kutime solena kaj daŭris ĝis tagmezo. Ĉeestis ĝin, krom kelkaj ambasadoroj, la vicministro pri kulturo, kiu komence salutis nin en bona Esperanto. Kongreson salutis ankaŭ landaj E-reprezentantoj. Ĉiam tre aprezata estas la sabatvespera Movada Foiro dum kiu oni interkonatiĝas kaj informiĝas pri diversaj E-organizoj. La Kleriga Lundo kaj la Tago de la Lernejo ankaŭ altiras multajn interesulojn. Dum la kongresa semajno okazis seminarioj pri diversaj temoj kaj diskutrondoj, kunvenoj, fakaj kaj sciencaj prelegoj, komitatkunsidoj, esperantologia konferenco, IKU, AIS, danc- kaj lingvaj kursoj, oratora kaj belarta konkursoj, aŭtoraj duonhoroj, aŭkcio, artaj aranĝoj, kaj aliaj interesaj programeroj. Estis pritraktita la kongresa temo - “Interproksimigo de kulturoj”, kaj oni parolis pri lingva diverseco en Latinameriko. Prezento de Mez-Amerika kulturriĉeco de Gvatemalo kaj Meksiko estis akompanata per trafaj bildoj. Multnombraj prelegoj pri Kubo nin konatigis kun la geografio, la muzikiloj, la tradicia ĉemizo “gvajabero”, la

sansistemo, la alfabetiga programo kaj kun aliaj kutimoj kaj belaĵoj por pli bona imago de la gastiganta lando.

La kongresa kuriero nomata “Havana Karavano” raportis pri ĵusaj okazintaĵoj, kunvenaj raportoj, atentigis nin pri certaj programeroj, diversaj anoncoj, aldonaj aliĝantoj ktp. Oni intervjuis plurajn geesperantistojn. Pri la evento ĉiutage raportis kuba televido kaj radio. Ankaŭ en gazetoj aperis artikolojn pri nia kongreso.

Estis elektita nova estraro, sed Probal Dasgupta daŭrigos sian prezidantecon. Dum akcepto en la hotelo “Habana Riviera” la vicministro pri la kulturo interŝanĝis donacojn kun la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino de la kongreso okazis KER ekzamenoj. Elstaraj aktivuloj de Esperanto estis premiitaj en la fermo de la UK. Al kubanoj estis ofertita kupono por ke ili povu aĉeti librojn aŭ aliajn esperantaĵojn en la libroservo. Paralele la gejunuloj havis sian propran programon en la hotelo Neptuno.

Amasan partoprenon kaj grandan intereson vekis la kulturaj kaj turismaj programeroj. Ni konatiĝis kun kuba kulturo, havis okazon sperti la ĉiutagan vivon de kubanoj kaj spekti la naturan belecon de la lando, ĝui maron kaj sinceran akcepton kaj helpemon de ĉiam gajaj kubanoj. Urbaj promenoj permesis malkovri ne nur la kolonian arkitekturon, pitoreskajn

lokojn, sed ankaŭ la ĉiutagan vivritmon de kubanoj. Tuttagaj ekskursoj al belaj lokoj ebligis admiri la belegan naturon, la penigan vivon de kamparanoj kaj la lukson de la konata feriejo Varadero.

La kubanoj sukcesis aranĝi buntajn kulturajn aranĝojn. En ĉiutaga posttagmeza kabaredo oni instruis danci la ŝatatajn “salsa”, “merenge” kaj aliajn kubajn dancojn. La E-muzikgrupo “Amindaj” animis kaj gajigis la ĉeestantojn. Montriĝis, ke ne nur kubanoj, sed ĉiuj lantinamerikanoj estas denaske ritme dotitaj. Aperis onidiro, ke pro la muziko la kubanoj ne havas tempon kuiru komplikajn manĝaĵojn. Do, rizo kun fazeoloj estas la ĉefa ĉiutaga manĝo. Kontraste, la bankedo ofertis plurajn pladojn por kontento de la partoprenantaj esperantistoj. La balo en latinamerika ritmo ĝojigis ĉiujn dancantojn.

Inter vesperaj kulturaj programeroj mi citas: nacian vesperon, teatraĵon, koncerton de “Interkant”, internacian artan vesperon. Neforgebla kaj bunta estis la nokta spektaklo en la plej fama kabaredo de Kubo “TROPICANA”.

### **41-A INFANA KONGRESETO**

Ĉe la fermo de la UK intervenis kvardeko da entuziasmaj infanoj, kiuj havis sian kongreseton ankaŭ en Havano. La kongreso estis plensukcesa kaj gaja, kiel kubanoj mem. Ni ĝuis belajn tagojn.

### **66A IJK**

La 66a Internacia Junulara

13

Kongreso. La lasta, kvara Esperanto-evento en Kubo - IJK okazis tuj post la 95-a Universala Kongreso, la lastan semajnon en julio, en la bela ĉemara turismejo “Villa Trópico” en la regiono de Matanzas. Ĝi situas mezdistance inter la ĉefurbo Havano kaj konata feriejo Varadero. Al la kongreso aliĝis 133 geesperantistoj, sed lastmomente aldoniĝis kelkaj pliaj. Bonŝance multaj latinamerikanoj havis unikan okazon partopreni la eventon. Krom kubanoj venis gejunuloj el Argentino, Bolivio, Brazilo, Dominika respubliko, Haitio, Meksiko, Nikaragvo, Peruo, Venezuelo. Tiel ekestis bunta mozaiko el diversaj landoj.

LKK-anoj zorgis pri transportado. Ĉe la alveno ni estis regalitaj per koktelo. Grupo de muzikistoj bonvenigis nin per tipaj kubaj kantoj. Amuza virin-viro invitis al dancado.

Pro la situo la kongreso estis iom pli ripoziga ol kutime. La fiksitajn programerojn oni kompletigis surloke per kelkaj aldonaj. La gejunuloj pasigis multe da tempo gaje amuziĝante ĉe la naĝejo. Okazis pilkludoj naĝejaj kaj herbejaj. Krome oni ĝissate profitis la maron. Ĝi estis ideala loko ne nur por naĝi, sed ankaŭ por observi submaran riĉecon de fiŝoj kaj koraloj en proksima koralrifo. Iuj profitis promenadon sur pedalŝipoj aŭ nur simplan sunumadon en ombro de kelkaj arboj kaj palmoj.

La ofertitaj servoj entenis trifojan

14

tagan manĝadon, libervolan servon ĉe la trinkejo, prunton de necesaj akcesoraĵoj por subakvigado, plaĝtukojn... Ni loĝis en komfortaj bangaloj panorame al maro. La apuda naturo de verda monto invitis al grimrado. Dum la promeno ni vizitis proksiman vilaĝon, kie ni gustumis kelkajn fruktojn kaj kokoson. Junuloj havis siajn komitatkunsidojn kaj prelegojn. Ĉe la komenco Marek Blahuš klarigis kio estas E@I, konatigis ĝiajn principojn kaj prezentis ties ambiciajn projektojn. Amri Wandel parolis kaj skizis la historion de TEJO - “Kiam, kiel, kial”. De Franklin Montenegro ni eksciis pri Yamar - Festo. La gejunuloj ŝatis diversajn danc-kaj lingvokursojn.

Tre interesa estis la Lingva Festivalo okazinta surloke ĉe la naĝejo. Oni prezentis pli ol dek lingvojn. Brazilanoj aldone invitis al “edziĝfesto - kvadrilo” (brazila kampara danco), kio estis gaja okazaĵo por ĉiuj ĉeestantoj. Paro el Danio regalis nin per tipaj produktoj: pano, fromaĝo, fiŝaĵo kaj likvoro. Ankaŭ rusoj regalis nin per kelkaj specialaĵoj: vodko kaj kaviaro. Aliaj proponis kelkajn surlokajn frandaĵojn. Meksikanoj, krom bela ekspozicio de memoraĵoj kaj kelkaj bongustaĵoj, prezentis tipan meksikan dancon. Ili estis bele kostumitaj. Koreoj instigis al kaligrafia skribado. Marek kaj mi prezentis la ĉehan lingvon. Kubanoj gaje dancis.

La vesperaj programeroj okazis en

teatrejo, kie oni poste povis “ĝui” noktan diskotekon. Interesitoj povis rigardi esperantigitajn filmojn. Ĝis malfruaj horoj funkciis la kutimaj “gufujo” kaj trinkejo ĉe la naĝejo. Tio sub tropikvarma kaj stelĉiela nokto estis agrabla okazo por babilado.

La hotelo dufoje proponis kaj organizis por ni profesion, kabaredan spektaklon kun muzika akompano. Ankaŭ la E-muzikgrupo “Amindaj” havis okazon prezenti sin kaj dancigi la ĉeestantojn. Dum la planita ekskursita tago, unu tuttaga ekskurso celis la proksiman urbon Matanzas kaj la alia vizitigis al ni Havanon. Dum nia restado ni spertis ankaŭ fortan tropikan pluvegon, dum kiu elbordiĝis la rivero kaj makulis per nigraj akvoj kaj malpuraĵoj la maron. Tamen, la sekvan tagon la maro denove helbluis. Ravaj estis la vesperaj sunsubiroj, kiuj kolorigis la ĉielon kaj la strandon ruĝe. Dum la IJK ni ĝuis trankvilon ĉe la bela plaĝo, bonajn manĝojn kaj gajan junulan etoson.

Liba Gabalda





Fotis kaj arangis Liba kaj Floreal Gabalda



95a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



HAVANO - KUBO



17 - 24 JULIO 2010



Fotis kaj arangis Liba kaj Floreal Gabalda





66-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO



KUBO



24 - 31 JULIO 2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

## Karstaj Tagoj 2010

Triesto atendas vin, deziranta prezenti sian unikan teritorion. La kalkoŝtona altebenaĵo, ĉizita de feinaj manoj, fascinos vin per siaj turitaj ŝtonaj kasteloj, por poste vin inviti al esplorado de la mistera subtera mondo, kie senĉesaj akvogutoj modlis plej fantastajn figurojn.

### Aŭtunaj Karstaj Tagoj en Triesto: 29/10 - 1/11/2010

Provizora programo:

#### Vendredo 29 oktobro

Ekde la 17<sup>a</sup> horo: akcepto de partoprenantoj, enhoteliĝo. Ĉe TEA-sidejo, klarigo de la programo, prezentado de bildoj pri Karsto, bufedo kaj interkonatiĝo ...

#### Sabato 30 - dimanĉo 31 oktobro

★ Vizitoj de Didaktika Naturcentro en *Basovizza*, kaj de la "Nigra Groto", promenado en Valo *Rosandra*; halto ĉe rifuĝejo *Premuda*;

★ per „tramo de *Opicina*“, al Obelisko, promenado laŭ la t.n. pado „Napoleona“, laŭ „Fiŝista pado“ kaj en parko de Kastelo *Miramar*;

**Lundo 1 novembro** – itinero tra la urbo; komuna tagmanĝo, tostado kaj ĝisrevidoj.

**Partoprenkotizo** inkluzivas la kompletan programon: tio estas aliĝo, 3 tranoktoj en dulita ĉambro kun propra banejo (sen matenmanĝo), 5 manĝoj (trinkaĵoj aparte pagendaj), ĉiuj vizitoj kaj transportoj, ĉiĉeronado esperantlingva.

**Eŭroj 220,00 persone**

La programo povos esti ŝanĝita, kaze de malfavora vetero: ekskursojn oni anstataŭigos per muzeaj, kastelaj vizitoj, k.a.

Pliaj informoj pri pagoj kaj definitiva programo riceveblas:

**Rete:** [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it);

[nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it); [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

**Telephone:** +39 040350093; 040 398562;

**Poŝte:** Triesta Esperanto-Asocio - Via Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Eblas plilongigi la restadon, anoncu vian intencon (ankaŭ en la aliĝilo mem).



Bildoj instruaj aŭ amuzaj pri dompartoj, manĝaĵoj kaj necesejo



Unu el la plej fidelaj kaj antikvaj membroj de EBG kaj de BEF